

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo 1968

Skisemajno en Aŭstrio



S-ro Geroldinger transdonas al s-ino Ritterspach
la unuan premion — libro pri Tirolo —.

Nia ŝatata kolego Hans Geroldinger el Linz la okanfojn organizis internacian Esperanto - skisemajnon en Aŭstrio. Ĉifoje ĝi okazis de 10.-17. 2. 68 en la proksimeco de Innsbruck. Aliĝis 51 personoj el 5 landoj (Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Peruo). Eĉ nia 81-jaraĝa membro Theo Fischer el Metzingen kuraĝis ĉeesti. La naturamika domo „Birgitzköpfl“ estis ideala restadejo por la skileporoj, ĉar ne nur sufiĉe

da neĝo estis en la regiono, sed ankaŭ la partoprenantoj estis inter si.

Ek de Innsbruck, kie ĉiuj kolektiĝis, per aŭtobuso ni veturis al Axamer Lizum. De ĉi tie per lifto ni svebis al nia celo en alteco de 2098 mtr. Afablaj gastigantoj jam atendis nin. Nepriskribebla estis la situo; neĝkovritaj tirolaj montoj ĉirkaŭis nin, le vetero estis favora, la suno faris sian plej eblan por brunigi nian

palan vizaĝon, la harmonio inter ni estis bonega, ĉiam regis humoro kaj bona apetito. Ĉu tio lasta estas mirige, kiam matene jam krias virkoko „venu al gimnastiko“ aŭ se skiinstruisto Ernesto per afablaj gestoj invitas la skiantojn „skioj paralele, genuoj antaŭen“?

La komencantoj kun favoro ekzercis sur proksima dek-livo, dum la spertaj ĉampionoj trovis vastan agadkam-

pon en la ĉirkaŭaĵo aŭ sur la Hoadl-deklivo. Tamen vespere neniu estis laca, ni komune kantis, ni rigardis diapozitivajn de lastjara skisemajno, de la kongreso en Fulda, de Sudfranco kaj la postvenonta kongresloko Avignon, ankaŭ de skandinavia Laplando, Alian vesperon oni kondukis nin al Turkio, Grekio kaj Monako. Estis aparta ĝuo vidi tiajn belajn diapozitivajn; ĉies fotoamanta koro batis pli rapide. Dum la amuza vespero okazis kelkaj surprizoj, aparte por tiuj, kiuj partoprenis la unuan fojon en ĉi tiu rondo. La ridado okazis laŭ la devizo: malica ĝojo estas la plej sincera. Jaŭdo oni povis vidi kelkajn komencantojn, kiuj estis ege okupitaj. La kaŭzo? En la programo staris . . . lingva konkuro. Lastfine neniu volis blami sin. Estis tre ĝojige, konstati, kiel kuraĝe preskaŭ ĉiuj partoprenis. La ĵugkomisiono ne havis facilan taskon, ĉar kelkaj inter la konkurantoj liveris bonajn rakontojn, anekdotojn, ŝercojn ktp. La unuan premion — libro pri tirolo — gajnis nia ĉiam bonhumora S-ino Elisabeth Ritterspach. Aliaj kvar premioj gajnis francaj geamikoj. Vendredon neĝis, neĝis, neĝis. La skikonkurso estis en danĝero. Sed estis la lasta tago, do la organizantoj forŝovis ĝin ĝis posttagmeze.

- Kvankam la suno ankaŭ nun ne aperis, startis 4 grupoj
- a) viroj kun malpli ol 42 jaraĝoj
 - b) viroj kun pli ol 42 jaroj
 - c) inoj (mallongigita vojo)
 - d) komencantoj (plimallongigita vojo)

La unuan premion je a) — granda arĝenta pokalo kaj medalo — gajnis Jean Mewel, Parizo

unuan premion je b) — mezgranda arĝenta pokalo kaj medalo — Fritz Ortmeier, Linz

unuan premion je c) — malgranda arĝenta pokalo kaj medalo — Lilian Poussard, Parizo

unuan premion je d) — arĝenta skiparo — René Duhanel, Parizo.

Entute estis gajnitaj 18 premioj.

Bedaŭrinde la plej sperta skileporeto Rosl Billmeier el Grafenaŭ havis malfeliĉon kaj ne povis partopreni la skikonkurson, alie ŝi tcerte estus gajninta la unuan premion. Hans Geroldinger tamen ne forgesis ŝin kaj ĉiuj estis kontentaj, ke ŝi ricevis konsolpremion.

Permesu, ke mi ĉi tie diru kelkajn vortojn pri la akcidento de Rosl. Sajnas al mi grave, publikigi tiun aferon, ĉar helppretco ne ĉiam estas komprenebla. Do, Rosl falis

dum skiveturado tiel malfavore, ke ŝi vundiĝis kaj devis esti transportita en hospitalon. Nia vigla aŭstra kolego Franz Wagner ĉion organizis, kunveturis al la hospitalo, ŝovis ŝin mem tien, kien ŝi devis esti kaj zorgis por tio, ke Rosl ne restis en la hospitalo, sed povis esti vespere denove inter ni. Vere amika agado kaj ĉiloke al Franz koran dankon miaflanke. Ankaŭ la aliaj geamikoj, kiuj helpis al ŝi dum la reveturado, estu dankataj. Rosl intertempe plibonfartas kaj ni esperu, ke ŝi baldaŭ tute resaniĝos.

La plej amuza aranĝo estis la karnevala vespero. De kie venis la belaj kostumoj? Oni nur povis miri pri la kapricoj kaj ideoj. La bonhumoro atingis dum ĉi tiu vespero ia kulminon. Eĉ la gastiganto kaj ties personaro stimulis al eksceso. Do, kara leganto, ne miru, ke estis frue matene, kiam la lastaj enlitiĝis.

Bedaŭrinde la fino venis tro, multe tro, frue. Kelkaj feliĉuloj povis resti ankoraŭ dum kelkaj tagoj en „Birgitzköpfel“, sed la plej multaj forveturis sabate. Kiam la lifto malaperis suben kun ni, ni aŭdis la voĉojn de la restantaj geamikoj, kiuj adiaŭis nin per la vortoj:

„Ĝis revido en la venonta jaro.“ E. K.

De Parizo al Madrido sen trajnsango

Oni povas esperi, ke jam en la venonta jaro la luksa TALGO-trajno de la Hispanaj Fervojoj povos trafiki rekte inter ambaŭ ĉefurboj malgraŭ la ŝpurdiverseco inter Hispanio kaj la cetera mezeŭropo. La veturdaŭro per tio reduktiĝos de 18 al 12-13 horoj.

La transiro de la larĝa ŝpuro (1668 mm) al la normala (1435 mm) okazos dumveture ĉe malalta rapideco,

la radaksoj preme malpli larĝigas helpe de aparte malvarmigeblaj reloj. Tiun ĉi problemsolvon oni ja rajtas nomi la „Ovon de Kolumbo“.

La hispana „TALGO“ povas konkurenci kun la „TRANS - EUROP - EKSPRESOJ“; krom la konduktoroj servas kelneroj kaj stervardoj, oni anoncas la staciojn plurlingve helpe de sonbendo, en la lavejoj troviĝas

murkontaktoj kun du tensioj por elektraj raziloj k. t. p.

(Laŭ „Der Deutsche Eisenbahner“ 1/2-68) Ri.

La redakcio atentigas, ke la fakprelego dum la 13a IFEF-kongreso 1961 en Barcelona okupiĝis pri la problemoj de la ŝpurdiverseco, ankaŭ menciante la projektojn de raddistanc-ŝanĝo sur la radakso. La „TALGO“-trajnon montras la titolbildo de LIF n-ro 1/1965.

Konata Esperanto-pioniro 90jara

La ĉuילande konata Esperanto-pioniro, Hofrat Hugo Steiner, Vieno, la 26an de februaro festis sian 90an naskiĝtagon. GEFA estis reprezentita de la prezidanto kaj sekretariino, ambaŭ membroj de la internacia „Amika Rondo Hugo Steiner“. Estis vera ĝojo, vidi la korpe kaj spirite vigran „naskiĝtaginfanon“ en la laborĉambro de lia vivkreaĵo, lia amata Internacia Esperanto-Muzeo. Per aparta skribajo kaj persone per la du estraranoj GEFA tutkore gratulis al sia malnova kaj maljuna amiko kaj deziras al Hofrat Hugo Steiner ankoraŭ multe da tempo kaj sano por daŭrigi lian okupon tiom ŝatatan. Krome GEFA disponigis 300 ŝilingojn por la IEMW-Fonduso. Ni ne pretervidu ĉi tie, ke s-ano Steiner apud multaj aliaj distingajoj, inter alie la



La 90jara kortega konsilisto Hugo Steiner vikle kaj bonhumore diskutas kun la naskiĝtag-gratulantoj.

germana meritkruco unua klaso, laste ricevis kvar novajn, nome la „Aŭstrian Honorkrucon por Scienco kaj Arto“, la Honormedalon en arĝento de la urbo Wien kaj okaze de la 90a naskiĝtago oni eĉ honorigis lin per nomigo de strato laŭ lia nomo en lia loĝloko Bisamberg apud Vieno. Krome li ricevis la plej altan distingajon de la tutaŭstria organizo „Milenium novum“, nome la „Granda ora insigno pro meritoj je la studanta junularo komerca.“

Hugo Steiner esperantistiĝis jam en 1911 kaj konatiĝis kun d-ro Zamenhof persone. En 1927 li fondis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno. Krome li estis longjara aktivulo en la UEA-komitato kaj -estraro kaj havas sennombrajn meritojn en la Esperanto-movado. Gi

Vizito en Londono.

Veninte de la franca fervojista esperantista jarkunveno mi vizitis Londonon. Dank' al la verda stelo jam sur la ŝipo inter Calais kaj Folkestone mi renkontis junan Esperantistinon el Ĉeĥoslovakio. Ni agrable interparolis ĝis nia alveno en Londono kaj ni adiaŭis kun la promeso renkonti en la Londona Esperantoklubo.

Post kelktaga vizito de konatuloj kaj rigardo de diversaj partoj de la urbo mi ankaŭ iris en la Esperanto-bibliotekon. Ĝi situas en la Holland Park Avenue n-ro 140, proksime de la stacio Holland Park de la subterfervojoj. En la teretaĝo estas oficiala vendejo por Esperantolibroj kaj samtempe informejo de la Brita Esperantista Asocio. En la unua etaĝo troviĝas en du

grandaj ĉambroj la biblioteko, kiu estas unu el la plej grandaj en la mondo. Oni afable akceptis min kaj montris al mi diversajn interesajn presajojn, ekzemple la unuan Esperantogazeton, kiu aperis antaŭ 80 jaroj en Nürnberg. Mi ankaŭ ricevis tie presitan programon pri ĉiuj Esperantovesperoj kaj -kursoj en Londono por la monatoj oktobro ĝis januaro.

La ĉefa kunveno de la Londona Esperantoklubo okazas ĉiun vendredon en la Fred Tallant Hall, 153 Drummond Street, proksime de la stacidomo Euston kaj de la subterfervoja stacio Euston Square. La kunveno konsistas el salono kun scenejo, salono kun bufedo, instrusalono kaj antaŭĉambro por la

vestaĵoj. La klubvespero okazas laŭ severa regulo. Je la 18a kaj duono komenciĝas la kurso por progresantoj, dumtempe la aliaj kolektas sin en la bufedsalono, trinkas teon, manĝas aŭ interparolas. Kvarono post la 19a la ĥoro iomete kantas. Je la 19a kaj duono komenciĝas la prelego pri ia aktuala aŭ interesa temo kun sekvonta diskutado. Krome oni salutas la eksterlandajn gastojn kaj ankaŭ la gastoj salutas. Kiam mi estis tie, ĉeestis esperantistoj el 5 fremdaj landoj. Mi transdonis la salutojn de la GEFA-estraro kaj la libron „Faktoj pri Germanujo“.

La Londona Esperantoklubo ja estas konata pri sia internacia atmosfero. Ankaŭ por

daurigo p. 5.

Esperanto-movade en najbara lando.

GEFA-redaktoro partoprenis grupvesperon en Kopenhago

Dank al la amikecaj interrilatoj kun kelkaj DEFA-anoj mi estis ĝustatempe informita kaj invitita por partopreni kunvenon de diversflankaj anoj de la lokaj Esperantogrupoj je la 26an de januaro 1968 en konstruaĵo de DSB. Ŝajnis al mi, ke mi ĵus kaptis unu el la plej gravaj prelegoj en tiu ĉi vintra programo; s-ro- Ib Schleicher, inĝeniero el Brøshøj parolis pri.

„Ĉu Esperanto estas taŭga kiel internacia lingvo?“

S-ano Schleicher bonege taŭgis referumi pri tiu demando, ĉar li unue, laŭ mia opinio, estas unu el la plej fortaj motoroj de la dana Esperanto-movado, kaj due, li praktikas Esperanton ĉiu tage en sia labora kaj familia sferoj. En sia hejmo li parolas kun siaj 5 infanoj nur esperantlingve. La rezulto de tiu ĉi klopodoj estas absolute kontentiga; lia sepjaraĝa filo tradukis, sen helpo la fabeloj de Andersen el Esperanto en la dana (infan-) lingvo.

La esploroj de la preleginto tuŝis la problemon: Ĉu Esperanto havas ŝancon kontraŭ la angla lingvo? En Danlando estas vaste disvastigita la opinio, ke la angla lingvo jam estas la mondlingvo. Tio estas senencaĵo, ĉar tiu vojo ne estas marŝebla rilate de diversaj politikaj aferoj. Ĉu Esperanto estas taŭga transpreni tiun taskon? Oni ne du-

bis eĉ unu momenton aŭskultinte la lertajn klarigojn de tiu spertulo.

Detale s-ro Schleicher raportis pri la klopodoj por la subskribkoleto (agado de UEA). Laŭ la raporto li skribis, telefonis kaj babilis kun preskaŭ ĉiuj altrangaj personoj en Danlando. Ĉu li demandis princeminon Margāret, ĉu eksĉefministron Kampmann, ĉu la frakciestrojn de la diversaj partioj, preskaŭ ĉiuj subskribis. Kelkfoje li ankaŭ malsukcesis, sed la rezulto estas impona. La ĉefa malhelpaĵo estas la malbona scio pri Esperanto. Laŭ la opinio de ĝis nun ne informitaj alparolintaj homoj la Esperanto-movado estas pelvo por strangaj subjektoj. Estonte ni bezonos pli bonan informadon nacilingvan en nia gazetaro. Ankaŭ solvo estas la instalaĵo de propraj Esperanto-lernejoj. Laŭ la dana leĝo tio estus eble, se la gepatroj dirus tion kaj pagus 10 % de la lerneja budĵeto en tiu speciala lernejo. Neniu havas senton kontraŭ Esperanto nur multaj kredas ke Esperanto ne taŭgas en la praktiko. La preleginto finiĝis kun la frazoj: „Montru ke Esperanto estas taŭga por ĉiuj celoj! Uzu Esperanton tage! Estu nia devizo, ĉiam levi kaj levi nivelon! Varbu novajn interesulojn kaj helpu, ke la malnovaj restos

en viaj grupoj! Faru interesajn grupvesperojn! Informu la eksteran mondon, ke Esperanto nur povas helpi solvi la lingvajn problemojn!“

Bedaŭrinde mi ne havis la okazon aŭskulti la duan parton de ĉi tiu parolado: „Esperanto kiel familia lingvo“

Ĉiun lundon vespere la DEFA-anoj de Kopenhago kaj ĉirkaŭaĵo kunvenis je la 19.30 horo en DSB-generaldirekcia konstruaĵo Sølvgade 40. Se vi visitos la ĉefurbon de Danlando ne forgesu lokon kaj tempon. Bonpreparita kafo de mia amiko Irving B. Sørensen atendos vin.

Dum mia restado en Kopenhago en la gastema hejmo de miaj geamikoj mi havis la feliĉon vidi parton de la geedziĝfesttago de princino Benedikte kaj princo Richard zu Sayn-Wittgenstein-Berleburg. Mi staris kunkune kun multaj flagsvingintaj homoj antaŭ la urbdomo por rigardi la akcepton en la urba halo je la 23an de januaro kaj aliaĵe mi vidis la reĝan familion veturante al la ĉaskastelo Klampenborg. Malgraŭ la ne bona vetero multaj homoj staris apud la vojoj, kiun uzis la reĝa familio, akompanita centoj da rajdĉasistoj en multkoloraj uniformoj. Restas impona impresio en mia memoro kaj denove mi dankas miajn geamikojn por tiuj belgaj tagoj. Graß

Aerkusenaj veturiloj interligos Brition kun la Kontinento

La Britaj Fervojoj venontjare malfermos transmaran pramservon per aerkusenaj „Hovercraft“-ŝipoj inter Dover kaj Boulogne. Tiucele oni ekkonstruis en Boulogne specialhavenon por la novaj trafikiloj, la kostojn oni

taksas je 3,5 milionoj da germanaj markoj.


Tiu haveno havos propran fervojstacion, kiu konektos ĝin kun Parizo. La novaj aerkusenaj veturiloj havos kapaciton de 250 pasaĝeroj kaj 30 aŭtomobiloj, la trans-

veturo de Dover al Boulogne daŭros 35 minutojn.

(Laŭ „Der Deutsche Eisenbahner“ 1/2-68) Ri.

La redakcio atentigas pri la fakprelego prezentita dum la 15a IFEF-kongreso 1963 en Stoke-on-Trent, kiu jam menciis tian projekton.

Nova bufedvagono en orienta Germanio



La vagonfarejo Ammendorf en orienta Germanio evoluis novan tipon de pasaĝer- kaj bufedvagono por granddistanca trafiko kun maksimuma rapideco de 160 km/h. Ĝiaj sep pasaĝerkupeoj disponigas 26 kuŝlokojn (ses po kvar kaj unu po du), la bufedo mem estas ekipita per elektraj fridujoj, kafkuirilo,

kolbas-varmigilo kaj kuirplato. Pli da teknikaj detaloj: tipo 47-BD; la rulekipaĵon formas boĝioj sen radaksteniloj kun rulradakslagroj, raddiametro 950 mm. Aŭtomata kuplilo SA 3, elektropneŭmatike regata premaerbremso, vagonventolado per premaero je povumo de 4000 kubaj metroj po horo,

elektra kurentprovizo 54 voltoj (kontinua kurento), povumo double 4,9 kilovatoj. Krome la vagono disponas pri trajnradio-instalaĵo kun regulebla laŭtparolilo en ĉiu kupeo kaj en la koridoro.

(Laŭ „Der Deutsche Eisenbahner“ 1/2-68; foto FPA)

Ri.

daurigo de p. 3.

la eksterlandanoj la klubvespero estas interesa kaj ĝojiga, ĉar oni tie renkontas gravajn personojn kiel la prezidanton de la Universala Esperanto-Asocio, profesoron d-ron Lapenna, kaj la gvidantojn de la Brita Esperanto-Asocio. Krome mi povis paroli kun la rusa aktoro Nikolaj Rytjkov, kiu en Germanio fariĝis konata, ĉar li en televidserio pri la Sovjetunio prezentis Lenin.

Precize je la 20a kaj duonkomenciĝas la paŭzo por kafotrinkado kaj konversacio

kun amikoj. Ĉiun duan vendredon finiĝas la vespero per la altgrada kurso, kiu daŭras de la 21a ĝis la 22a. En tiu kurso povas plibonigi ĉiuj partoprenantoj siajn lingvosciojn.

Bone kaj agrable mi trovis la faktan, ke oni dum la tuta vespero vere parolis Esperanton kaj ne prefere la nacian lingvon, kiel mi kelkfoje travivis ĉe klubvesperoj aliloke. Entute la programo estas tre varia. Ĉi tie kelkaj punktoj el la ampleksa programo de la Londona Esperantoklubo: Angoroj, sonfilmo en Esperanto, prelego

de prof. d-ro Lapenna pri postkongresaj pensoj, lumbildprelego pri vojaĝo tra Siberio ĝis Nederlando, Kristnaska foiro, Literatura recitado de Nikolaj Rytjkov, Zamenhofvespero, Novjara Balo, prelegoj pri la temoj: Kiel trovi siajn praavojn kaj: Kie vi laboras k. t. p.

Mi nur povas rekomendi, ke ĉiu Esperantoamiko vizitu la klubon, kiam li iafoj vizitos Londonon. Kun bonaj instigoj por la propra Esperantolaboro mi veturis hejmen trans Dover — Oostende al Germanio.

H. Schindler, Schwelm

Moderna virino — la bulgarino nuntempa

Bulgario ekde 1396 dum preskaŭ 500 jaroj estis turka provinco. Precize antaŭ 90 jaroj la rusoj finigis la turkan aŭtokration. Ĝis tiam la bulgara virino en la oficiala vivo absolute ne ludis rolon, ŝi nur estis kvazaŭ labor — kaj dombesto. Tamen la bulgaroj estis praaĝa kulturpopolo, ili prave fieras pri tio, ke ilia monaĥo Kyrillos kreis je 850 propran slavan, nome la „kirilan“ skribmanieron, kiel ĝi ankoraŭ hodiaŭ estas uzata de la rusoj.

Antaŭ 24 jaroj la bulgarino vere estis „liberigita“. 1944, tuj post la tiea militfino, ŝi fariĝis pere de leĝo samrajta kun la viro. Ĉi tiu stato 3 jarojn poste laŭ la respublika regularo estis firme fiksita. Hodiaŭ triono de la parlamentanoj estas virinoj.

Ĉe ĉirkaŭ 8,3 milionoj da enloĝantoj kaj virintroj de dek procentoj en la publika administrado 22,9 procentoj da virinoj estas okupataj, en la scienca kaj teknika regionoj ĉirkaŭ la

duono, en la kultura kaj lerneja 62 procentoj. Pli granda, nome 69,3 procentoj, estas la porcio ĉe la kuracistoj, en la medicina kaj sociala kampoj. La industrio okupas 39 procentojn, la ekonomio ĉirkaŭ 50 procentoj da virinoj. Inter la 2,2 milionoj da laboristoj kaj dungistoj estas 40,3 procentoj da virinoj, speciale alta estas la pro porcio en la teksindustrio kun preskaŭ 77 procentoj.

En Bulgario ne ekzistas „die Pille“ (la pilolo); la naskiĝnombro tiel multe malpliĝis, ke la ŝtato per multe da diversaj rimedoj provas plialtigi ĝin. Ĉe la unua infano la patrino ricevas, sendepende de principe libera kuracist- kaj hospital-terapio, subtenon de 20 Lewa kaj infanmonon de 5 Lewa; ĉe la dua infano ŝi ricevas unufoje 200 kaj monate 15 Lewa, ekde la tria infano ŝi ricevas 500 respektive 35 Lewa.

Al alta protekto de patrino kaj infano servas same gradita, pagita libertempo de 120, 150 aŭ 180 tagoj; la patrino rajtas preni sen malavan taĝojn ankoraŭ senpagitajn feriojn de 8, 9 respektive 12 monatoj.

Plej frue kun 16 jaroj la juna bulgarino povas — ŝi estas moderna knabino, kaj la „mini“-jupo ankoraŭ en vilaĝo estas memkomprenebla, kvankam ilia avino eventuale ankoraŭ estis vualita — sin okupi profesie.

La plimulto, same kiel la knaboj, ne kontentigas je okjara lerneja devo, ĉar, ju pli ili lernas kaj kapablas, des pli altaj estas la ŝancoj kaj la gajno. La profesiaj lernejoj, senkostaj kiel ĉiuj lernejoj, plej ofte havas pensionsimilajn loĝhejmojn, kies kostoj inkluzive la planan pensionon transprenas la ŝtato.

Resumo el raporto, kiu aperis en „Der deutsche Eisenbahner“ No. 4/68

tradukis ĝin E. Kruse

Flugo al Varna

Sofia al 13.05 ek 13.45

Wien al 16.45 ek 17.35

Frankfurt al 19.05

Krome trafikas ĉiutage de

Varna al Sofia jenaj maŝinoj:

Varna ek 7.35, 9.05, 10.35,

16.05, 16.20, 19.05

Sofia al 8.35, 10.05, 11.50,

17.05, 17.45, 20.05.

Oni povos flugi per unu el ĉi tiuj maŝinoj de Varna al Sofia kaj daŭrigi la flugon post unu aŭ plurtaga restado per unu el la rektaj aviadiloj de Sofia al Frankfurt. La biletoj por aviadilo kaj kuŝvagono estos eldonataj loke antaŭ forveturo en Frankfurt resp. München.

Ni tre bedaŭras, ke la maŝinoj, kiujn firme promesis la bulgara aertrafikkompanio

TABSO por 18. kaj 25. 5., ne flugos. Tio evidente dependas de instrukcioj finfine nun - post longaj monatoj - donitaj el Sofia. Tio metas nin, la organizantojn same kiel la kolegojn, kiuj intencis uzi ĉi tiujn aviadilojn, en grandan embarason. Tiuj, kiuj deziris reflugi la 18. 5., uzu la rektan specialan kuŝvagonon Varna - München, kiu forlasos Varna 17. 5. 19.48 h kaj alvenos en München 19. 5. 9.41 h. La koncernaj kolegoj bv. tuj kontaktigi kun la GEFA-sekretariejo. Kiu do ne povos reflugi, pagos 150 GM pli malmulte aŭ ricevos tiun monon, se ĝi jam estas pagita. La prezo por la kuŝvagono (du noktoj) estas 25,— GM. GEFA

Jen la trafiktagoj kaj - tempoj de la aviadiloj: direkto Frankfurt/M. — Varna (rekta aviadilo)

jaŭdon 9. 5. Frankfurt ek 14.50

Wien al 16.20 ek 17.00

Sofia al 20.00 ek 20.35

Varna al 21.35

en la flughaveno Varna estas ebleco ŝanĝi monon.

Inter Frankfurt Hbf kaj la aerdomo trafikas speciala omnibuso. Ĝi ekveturas de „Aircenter“, kiu troviĝas vidal-vide de la suda elirejo el la ĉefstacidomo. Bonvolu esti ĉe „Aircenter“ je 13.30 h.

En la aviadilo oni prezentos manĝaĵon.

direkto Varna — Frankfurt/M 22. 5., 29. 5., 1. 6., 5. 6. (rekta aviadilo)

Varna ek 12.05

El la grupoj

Essen/Dortmund

Das Rheinisch-Westfälische Auslandsinstitut hat im Rahmen seiner Arbeitskreise für Landeskunde, Literatur und Sprache die Veranstaltungen des Esperanto-Kreises als regelmäßige Beiträge aufgenommen. Die Gruppe trifft sich montags um 18 Uhr. Am 22. 4. wird den Mitgliedern ein Vortrag „Ungarn in der Esperanto-Literatur“ geboten.

Frankfurt

Al interesigitaj grupomembroj estas montrita la 13an de marto 30-minuta kolorfilmo pri la lastjara IFEF-kongreso en Fulda. Ankoraufoje vicigis sceno post sceno, lerte filmita de la aŭstra kolego Geroldinger. Tiu filmo kaj la alia, produktita de la iama LKK-ano Barnickel, estas prezentitaj ankaŭ ĉe aliaj grupoj en Stuttgart kaj Weiden.

Herzberg (Harz)

Kiel anoncite en Bulteno 1/68, la nove fondita Esperanto-grupo Herzberg sukcese partoprenis en „hobio-ekspozicio“ aranĝita de la urbo Herzberg. La loka gazeto i. a. raportis: „Grave kontribuis al la ekspozicio la du Esperanto-grupoj (GEFA kaj GEA), kiuj estis reprezentitaj per ampleksa kolektaĵo de esperantolingva informmaterialo. En multaj personaj diskutoj la grupgvidantoj Joachim Gießner kaj August Bierwirth klarigis la celojn de la Internacia Lingvo. Tre impresive ili substrekis tiujn klarigojn helpe de surdiskaj paroladoj kaj kantoj. Esperantoletoroj el la tuta mondo pruvis, ke per Esperanto fakte estas eble flegi kontaktojn kun ĉiuj homoj sur la terglobo. Fotografajoj de kongreso,

belega primitiva poŝmarkkolektaĵo, prospektoj de enkaj eksterlandaj urboj kaj de la Germana Federacia Fervovo pruvis, ke Esperanto estas — kompare al aliaj fremdlingvoj — facile lernebla lingvo, kiu en multnombraj landoj estas favorigata de ŝtataj instancoj. Gazetoj, revuoj, originala Esperantoliteraturo same kiel tradukaĵoj de konataj verkoj, eĉ klasikaj, kompletigis la impresplenan bildon.“

Köln/Rheydt

Zu dem am 3. 2. 1968 stattgefundenen karnevalistischen Eisenbahnerfest hat die Ortsstelle Rheydt des BSW eine reich illustrierte Programmschrift herausgebracht, in der, sehr gut plaziert, eine ansprechende Esperanto-Werbung aufgenommen wurde.

Stuttgart

Zu einem Wochenendtreffen vereinigten sich im Oktober v. J. die Esperantisten der Landeshauptstadt und deren näherer Umgebung. Bei Gesang und Spiel erntete, in froher Runde, besonders unsere jugendliche Künstlerin Marianne Braun herzlichen Beifall für ihre ausgezeichneten Solodarbietungen, die bereits in Fulda mit großer Begeisterung aufgenommen wurden. Der Vorsitzende der Esperanto-Gruppe Stuttgart zeigte seine Kostümpuppensammlung, die er mit Hilfe seiner ausländischen Esperantofreunde in liebevoller Kleinarbeit zusammengetragen hat. Eine Arbeitstagung und eine gemeinsame Wanderung durch die herbstlichen Wälder beschlossen die harmonisch verlaufene Veranstaltung.

Aus Anlaß einer Personalversammlung des AW Stuttgart-Bad Cannstadt im Okto-

ber v. J. erläuterte unser Mitglied Lorch vor ca. 800 Teilnehmern die derzeitige Esperanto-Situation. Die Ausführungen fanden ein positives Echo und lösten eine rege Diskussion aus, an der sich u. a. der Direktor des Werkes, Herr BOR Zirn und der Vorsitzende des Personalrates, Herr Riedel beteiligten. Beiden Herren sind wir für die empfehlenden Worte dankbar.

Bei den Eisenbahnfachschulen begannen im November wieder Esperanto-Kurse in Stuttgart und erstmals in Laupheim. Über die Zusammenkunft zum Tage des Esperantobuches wurde bereits im Bulteno 1/68 berichtet. Hierbei nahm Herr Pickel aus Nürnberg Stellung zur derzeitigen Situation der Esperanto-Organisationen. Die eingeladenen Vertreter der Eisenbahnfachschule Stuttgart bekundeten ihr reges Interesse an den verschiedenen Darbietungen. Nachruf: Am 10. 11. 1967 verstarb in Eblingen Herr Hermann Wagner, Vorsitzender der Naturfreunde - Esperantisten in Deutschland. Sein Leben galt der Esperanto-Idee; mit den Eisenbahner-Esperantisten verbanden ihn zahlreiche Freundschaften. In unseren Reihen werden wir seiner stets gedenken.

Peto al la eksterlandanaj geamikoj!

En n-ro 1/1968 ni komunikas la redigitan adresaron de la GEFA-estraranoj kaj de la distrikta komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn. Ni urĝe petas informi nian sekretarinon, s-inon Kruse, 6 Frankfurt/Main, Karlstraße 6—6, se vi havas aliajn dezirojn rilate la akcepto de nia Bulteno.

GEFA-estraranoj

Stuttgart

Pli ol tridek fervoraj adeptoj de Esperanto sekvis la inviton de la grupo Laupheim, partopreni la jarkunvenon de la distrikto Stuttgart la 9an de marto. Grupestro Jocham kore bonvenigis ĉiujn, precipe la gastojn el la najbaraj distriktoj Augsburg, Frankfurt kaj Nürnberg. Pri la agado en la distrikto Stuttgart raportis koncize la komisiito Kiefer. Montriĝis ke la membroj de la distrikto Stuttgart estas tre aktivaj rilate la lingvolernadon kaj partoprenon al naciaj kaj internaciaj renkontiĝoj. Ankaŭ pri la venonta IFEF-kongreso en Bulgario ekzistas konsiderinda intereso.

Agrablajn rememorojn pri la lastjara IFEF-kongreso en Fulda vekis kolorfilmo, lerte farita de la aŭstra kolego Geroldinger, samkiel multnombraj diapozitivoj. Bone ekipita loterio havigis plaĉajn premiojn. Por la distra parto kontribuis kelkaj aktivaĵoj per muzikaĵoj kaj ŝercoj. La juna f-ino Braun ricevis multnombrajn aplaŭdojn pro la prezentitaj kantoj. Komprenable ne mankis la dancado ĝis post noktmezo.

Bulgarujo sen vizio en 1968

Bulgarujo decidis plilongigi la senvizan sistemon, kiun ĝi enkondukis en 1967, okaze de la internacia turisma jaro.

Turistoj el ĉiuj landoj, kiuj vizitos Bulgarujon en 1968 kaj kiuj restos en la lando pli ol 24 horojn kaj malpli ol du monatojn, plu ne bezonos enirvizon.

La vizo restos necesa por trairentoj, membroj de diplomaciaj instancoj, komercistoj kaj eksterlandaj studentoj en Bulgarujo.

Die diesjähriĝe 12. GEFA-Jahresversammlung findet vom 11. bis 13. 10. in Neustadt/Weinstraße statt. Nähere Hinweise folgen zu einem späteren Zeitpunkt.

Dankon sinceran al ĉiuj organizintoj kaj kontribuintoj de tiu imitinda kunveno.

Wuppertal/Hagen

Die Jahreshauptversammlung des Bezirks Wuppertal wurde von 20 Teilnehmern besucht. Der Bezirksbeauftragte zeigte die Dia-Serie vom 19. IFEF-Kongreß, die für GEFA von unserem Freund Bartz in Dortmund hergestellt wurde. Unser Mitglied Schindler führte die Dias vom UEA-Kongreß in Sofia vor, um bei den bisher noch unentschlossenen Interessenten für den diesjährigen Kongreß in Varna zu werben. Dank der rührigen Vorarbeiten des für den Raum Hagen zuständigen Herrn Hermanns werden sich die Esperantisten der verschiedensten Vereinigungen künftig an jedem 2. Montag im Monat um 18.00 Uhr im Unterrichtsraum des Hauptbahnhofs Hagen treffen. Die Bildung einer Gruppe ist in Aussicht genommen.

Berichtigungen:

Der SAT-Kongreß findet vom 3. bis 9. 8. 1968 in Utrecht/Niederlande statt.

Zur Einreise in die Türkei

wird lediglich ein Sichtvermerk gefordert, der bei der Einreise (z. B. auf dem Schiff) formlos erteilt wird.

L. Zamenhof: Granda vortaro germana esperanta.

Odeso 1894. 16p. Fotopreso: Artur E. Iltis, 1968.

Per tiu ĉi fotorepreso de Zamenhof-vortaro el 1894 reaperigos la serio da malnovaj valoraj verkoj, delonge elĉerpitaj. La prezo estas 3 GM, pagata al s-ro R. Hauptenthal, Kreissparkasse Sulzbach/Saar, Konto-Nr. 203-393 63 aŭ Poŝtĉekkonto Saarbrücken 15293. Pliaj titoloj verŝajne sekvos: Unua libro (1887) de L. Zamenhof, en germana lingvo. „Mondo kaj koro“ (1921) de K. Kalocsay. „Die Verhältnisse der Esperanto“ de E. Wüster (1924) kaj „Zamenhof“ (1929) de E. Drezén.

Mallonge

Kvar milionoj da fervojaj horaroj.

La oficiala horaro de Germana Federacia Fervojo, en kiu ek de 1953 Esperanto estas utiligata flanke de la ĉefaj naciaj lingvoj, ĝis nun aperis en pli ol kvar milionoj da ekzempleroj.

Niaj kongresoj

Bulgara kongreso. Tuj post la IFEF-kongreso, de la 19a ĝis la 21a de majo, en Varna okazos la 37a Bulgara Esperantokongreso.

53a Universala Kongreso de Esperanto

Madrido, 3a ĝis 10a de aŭgusto 1968

Oficiala observanto vizitos la infanan kongreseton.

La ĝenerala direktoro pri la infana instruado de Hispanujo, J. Tena Artigas, decidis sendi oficialan observanton al la 11a infana kongreseto, kiu okazos en la kadro de la madrida universala Esperanto-kongreso.

(Hispana Esperanto instituto, Barcelono, Apartado 2428).

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.